ŬONBULISMO

Ŭonbulismo estas religio, kiun en 1916 fondis **Sotesano** (1891-1943) en Koreio. Ĝi prenas, kiel kredobjekton kaj praktikmodelon, la darmkorpan budhon, unu cirklon. Sotesano esprimis per **unu cirklo** la fundamentan veron de la universo, pri kiu li iluminiĝis post dudekjara penado, kaj li renovigis la tradician budhismon.

Ŭonbulismo instruas siajn kredantojn konscii profunde la bonfarojn de ĉiuj estaĵoj kaj danki ilin. La kerna vorto de ŭonbulismo do estas "**bonfaro**", per kiu interrilatas ĉiuj estaĵoj en la universo. Ŭonbulismo celas disvolvi homan spiriton per verreligia kredo kaj realmorala trejno, responde al materia evoluo.

La fundamenta doktrino de ŭonbulismo konsistas el la **kvar bonfaroj** (tiuj de ĉielo-tero, gepatroj, kunvivuloj kaj leĝoj) kaj la **kvar neprafoj** (kreskigo de propra forto, unuaigo al saĝulo, eduko de aliula infano kaj estimo al sindonulo), kaj el la **tri studoj** (spirita kultivo, afera-principa esploro kaj justaga elekto) kaj la **ok sintenoj** (kredo, kuraĝo, scivolo, penado, nekredo, avido, maldiligento kaj malsaĝo). La **kvar devizoj** de ŭonbulismo estas ĝustaj iluminiĝo kaj ago, pribonfara konscio kaj danko, utiligo de la budha darmo, kaj sindonema servo al publiko.

Sotesano post sia iluminiĝo tralegis multajn tekstojn de tradiciaj religioj kaj fine konsideris Ŝakjamunion sanktulo el la sanktuloj kaj decidiĝis fondi novan eklezion, surbaze de la budha darmo. Ŭonbulismo strebas al la ĝisdatigo, vivutiligo kaj popularigo de la budha darmo kaj ankaŭ utiligas instruojn de ekzistantaj religioj.

Nun ŭonbulismo havas firman statuson en la korea socio kaj disvastiĝas tra la mondo.

La religia nomo **ŭonbulismo** en Esperanto estas derivita el la nomo **ŭonbulgjo** en la korea: **ŭon** signifas la vero de unu cirklo, **bul** iluminiĝo, budho kaj **gjo** instruo. Do ŭonbulismo estas religio, kiu instruas homojn kredi, klarvidi kaj praktiki la veron de unu cirklo.

E A Ŭ

EAŬ (Esperantista Asocio de Ŭonbulismo) celas disvastigi Esperanton inter ŭonbulanoj kaj ŭonbulismon inter esperantistoj.

En 1980 kelkaj junaj kredantoj de ŭonbulismo ekkonigis Esperanton al la eklezio kaj tradukadis sanktajn tekstojn de ŭonbulismo en Esperanton. La kvara eklezia estro, ĉefmajstro Ĝŭasano, forte subtenis la Esperanto-movadon. Danke al liaj inspiroj kaj al la eklezia subteno ĉiuj sanktaj libroj de ŭonbulismo estis tradukitaj en Esperanton.

Unu el la grandaj atingoj de EAŬ estis en 2004 sukcesa enkonduko de Esperanto kiel alternativa studobjekto de la eklezia universitato *Wonkwang*. Dum pluraj jaroj pli ol 50 studentoj lernis Esperanton. Nun EAŬ strebas, por ke speciale Esperanton lernu estontaj gepastroj, kiuj interesiĝas pri internacia agado.

EAŬ faris gravan paŝon al la Internacia Esperanto-Renkontiĝo de Meditado, kiun la eklezia internacia fako de ŭonbulismo ĉiujare organizis en la angla lingvo, sed ekde la jaro 2006 EAŬ konstante organizas ĝin en Esperanto.

EAŬ sukcese debutis per sia faka kunsido kadre de la 90a UK en Vilno kaj daŭrigis ĝin en Florenco, Jokohamo, Roterdamo, Bjalistoko, Kopenhago, Hanojo, Rejkjaviko, Bonaero kaj Lillo. EAŬ-anoj invitas vin ĉeesti la fakan kunsidon, ĝui la ŭonbulanan etoson kaj informiĝi pri la speciala evento "Bonvenon al Ŭonbulismo" okazonta tuj post la Seula UK en 2017.

Esperantista Asocio de Ŭonbulismo
ĉe la Internacia Fako de Ŭonbulismo
Iksandaero 501, Iksan-si, KR-570-754,
Korea Respubliko; Tel. +82 63 850 3171;
bwjung88@hanmail.net;
http://uonbulismo.net
http://cafe.daum.net/zinio81
https://facebook.com/
groups/152447724909961/

Okaze de la Seula Universala Kongreso en 2017

BONVENONON AL ŬONBULISMO

- 13a Internacia Esperanto-Renkontiĝo de Meditado -

△ Partoprenantoj de la 12a IERM en 2016

Esperantista Asocio de Ŭonbulismo (EAŬ)

ĉiujare okazigas renkontiĝon kun diversaj programeroj, en kiu oni povas praktiki meditadon, fari komunajn ekskursojn al vizitindaj lokoj, sperti korean kulturon, ekkoni pri ŭonbulismo kaj tiel plu. Kadre de la 13a IERM, EAŬ organizas la specialan eventon "**Bonvenon al Ŭonbulismo**" por esperantistoj, kiuj volas pli interesiĝi kaj ekkoni pri ŭonbulismo kaj sudokcidenta Koreio tuj post la Seula Universala Kongreso de Esperanto en 2017.

1. **Kiam:** 2017 julio 29 (sabato) post la UK - aŭgusto 1 (mardo) en Seulo
2. **Kie:** Iksan, Bjonsan, Jongsan (gravaj sanktaj lokoj de ŭonbulismo)
3. **Enhavo:** meditado, ekskursoj, koncertoj, prelegoj
4. **Kotizo:** 50 eŭroj (programo, manĝo, loĝo, ekskursoj, veturo)
5. **Nombro:** ĝis 70 personoj
6. **Prelegoj:** temoj pri meditado estas bonvenaj.
7. **Kontakto kaj aliĝo:** ĉe CHOE Taesok (chtaesok@hanmail.net)

Kion ni faros?

△ Ni meditos matene kaj vespere.

△ Iuj prelegos, aliaj aŭskultos

△ Ni vizitos la ekleziestron de ŭonbulismo.

△ Ni spertos korean kulturon.

△ Ni ĝuos koreajn teon kaj manĝon.

△ Ni vizitos sanktajn lokojn de ŭonbulismo.

△ Unu el niaj tranoktejoj

Aliĝilo

- **Nomo** (persona, familia)**:**
- **Naskiĝdato** (jaro, monato, tago)**:**
- **Sekso:**
- **Adreso** (strato, urbo, lando)**:**
- **Retadreso:**
- **Kotizo 50 eŭroj:** mi pagos surloke en la unua tago.
- **Mi ŝatus kontribui al la programo per la jena temo:**

* **Bv. e**nskribi kaj sendi vian aliĝilon al chtaesok@hanmail.net

Fotoj el la Centjara Jubilea Ceremonio de Ŭonbulismo en majo 2016

△ Kolektiĝis pli ol kvindek mil ŭonbulanoj.

△ Ĉeestis ankaŭ dekoj da esperantistoj.

△ Kun la Ĉefdirektoro de Oomoto el Japanio

△ Tradukoj en 10 lingvoj